



Oficiala Organo
de _____

Flandra _____

Ligo _____

Esperantista _____



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belga

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

Sekve al la malvalorigo de la belga valuto, la prezo de ĉiuj libroj eldonitaj eksterlande, treege plialtiĝis.

Pro tiu kaŭzo ni provizore ne renovigos la stokon de F. E. I. kaj reaĉetos nur laŭproporcie de la ricevitaj mendoj.

La varoj de kiuj restas provizo, estas vendataj je la originala prezo, ĝis elĉerpiĝo.

La novaj prezoj estos kalkulataj kiel eble plej favore; sekve ni estas devigataj provizore ne plu konsenti rabaton al la grupoj, sed anstataŭe la sendkostoj ne devas esti pagataj, escepte por mendoj de malpli ol 10 frankoj.

EL LA PREZARO:

Elektitaj Noveloj — Lode Backelmans	Fr.	7,50	broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor		10,—	»
La Du Amatinoj — de Musset		7,50	»
La Junulino el Stormyr — Selma Lagerlöf		12,—	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf		12,—	»
La Infanoj de Betlehem — Selma Lagerlöf		5,—	»
Dialogoj kaj Komedietoj — E. Dahl		3,75	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto		4,—	»
La Stranga Butiko — R. Schwartz		17,—	»
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz		17,—	»
Gaja Lernolibro (ilustrita)		12,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck		5,—	»
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)		2,—	»
Schidlof Zakwoordenboek		22,50	»
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a kaj 5-a jarkolektoj (kompl.)		15,—	»
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1)		10,—	»
Flageto por biciklo		6,—	»
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto		2,—	»

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Vedra stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.

Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Glumarkoj « Vredesaktie » po 3 fr. por 100.


Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 t.

Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate



Redakcia-
adreso:
Houwerstraat, 22
Antwerpen.
Tel. : 277.51.



Administranto :
Gerard Debrouwere
Magdalenastr. 29
Kortrijk
Tel. : 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belga
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.
Poŝteko : 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
A. LODEMA kaj aliaj.



Willem de Zwijger (ligno-inkrustaĵo, vidu paĝon 163.)

Aan alle Vlaamsche Esperantisten !

Reeds meer dan twee maanden is het geleden, dat wij onzen vriend Juul Karnas ten grave geleidden. Van de schoone bloemen, die zijn groeve sierden, is niets meer over... vergaan, verwelkt in vollen levensbloei, zooals hij zelf. Nu is er alleen een grauwe aardhoop.

Vlaamsche Esperantisten, moet dit zoo blijven? Voor de eerste maal sinds zijn bestaan is de Flandra Ligo Esperantista getroffen door het verlies van een zijner méést vooraanstaanden. Het is onze plicht aan de levenden te laten zien *welke* doode onder dien grauwen aardhoop rust.

Daartoe heeft zich een komiteit gevormd, hetwelk zich ten doel stelt, in overleg met de familie, een gedenksteen aan te brengen op het graf.

Wij verwachten, dat iedere Vlaamsche Esperantist(e) zijn of haar steentje bijbrengt om dit doel te verwezenlijken.

En het wordt U gemakkelijk gemaakt! Er bestaat n. l. nog een hoeveelheid van het liederenboekje « Kantaro Esperantista », samengesteld door Juul Karnas. De prijs is fr. 6.— per boekje. Welnu: van ieder boekje, dat gekocht wordt, stelt de uitgever 4 fr. voor het goede doel ter hand aan het komiteit. Verder zal er met intekenlijsten gewerkt worden, waarbij de leiders der verschillende groepen vriendelijk verzocht worden hunne medewerking te verleenen.

Deze intekenlijsten dienen voornamelijk om hen te bereiken, die reeds een boekje bezitten, het niet wenschen of... die wat meer kunnen of willen missen om het komiteit in staat te stellen zijn werk tot een goed einde te brengen.

Ieder, die dus een boekje wenscht, wordt verzocht zich te wenden tot den schatbewaarder van het komiteit, den Heer H. v. d. Mast, Tweelingstraat, 6, Antwerpen. Postrekening: 2098.52.

Ook stortingen voor hetzelfde doel, zonder dat men een boekje verlangt kunnen aan het zelfde adres overgemaakt worden.

Het ligt verder in het voornemen van het komiteit, om het gedenkteken te onthullen op een Zondag die samenvalt met de eerste vergadering van Flandra Ligo Esperantista, na het kongres van Brussel.

Deze vergadering zal dan te Antwerpen plaats hebben.

Het bovengenoemde plan werd reeds ontvouwd op de laatste vergadering van F. L. E. van den 24 Maart en verwierf de volledige instemming van het Bestuur, de groepleiders, de redactie van « Flandra Esperantisto » en verdere aanwezigen.

Alle ontvangsten zullen verantwoord worden!

Vlaamsche Esperantisten, helpt ons naar vermogen!

Het komiteit:

Mej. Leonie JOUKES — Voorzitster.

Mijnheer A. MEIRE — Schrijver.

» H. VAN DER MAST — Schatbewaarder.

Tweelingstraat, 6, Antwerpen.

Postrekening 2098.52.

» H. VAN DURME — Lid.

Flandra Ligo Esperantista

Dimanĉe, 24-3-35, okazis ĝenerala kunveno de F. L. E. en la ejo « Breughel », Jacquainlaan, Brussel.

Ĝin ĉeestis: delegitoj de la grupoj el Antwerpen (Flandrema grupo Esp. kaj Rekta Vojo), el Aalst, Brussel, Mechelen, Oudenaarde, Hamme, Aarschof, Roeselare, Ronse, Kortrijk, kaj izolaj samideanoj el diversaj lokoj.

Tuj post malfermo de la kunsido, la Prezidanto, S-ro Calloens, revekas la karan memoron de samideano Juul Karnas, ĉefredaktoro de F. E., mortinta en Lausanne. La ĉeestantoj gardas minuton da silento. La prezidanto dankas pro lia multflanka laboro farita por la Flandra Esp. movado kaj legas kopion de letero sendita al Sinjorino Karnas, por prezenti la esprimon de nia tutkora kunsento en la dolora funebro. Li ankaŭ dankas S-anon Lodema kiu prizorgis la partoprenon de la Ligo al la entombigo.

La sekretario laŭtlegas la protokolaron de la antaŭa kunveno, kiu estas aprobatata.

La prezidanto dankas la ĉeestantojn kaj atentigas pri la utileco de partopreno al la ligaj kunvenoj. Ĉiu grupo senescepte nepre devus sendi almenaŭ unu delegiton. Ne ĉiuj aferoj estas ĉiam « skribebblaj » nek diskutebblaj perletere; ofte ni spertis ke tiaj aferoj solviĝas aŭtomate dum la kunvenoj; tial, venu ĉiam multope, kunlaboru aktive!

La kasisto raportas pri la nuna stato de la ligaj financoj, kiuj estas relative bonaj; la enkaso estas 4.419 frankoj, la antaŭvidita defecito je fino de la laborjaro estos 400 fr.

Ekde kelka tempo la abonombro restis stabila; se en kelkaj lokoj ĝi iom reiris, progreson ni notis en Ronse, Roeselaere kaj Oostende, en kiuj urboj ni havas plurajn fervorajn laborantojn.

Bedaŭrinde ni devas kontraŭagi spiritstaton pli kaj pli dange- ran, kiu minacas fariĝi ankaŭ plagon en nia movado, nome ke oni tro facile uzas la vorton « krizo » kiel preteksto por ne repagi la kotizon. Ni alvokas niajn fidelulojn por propagandi persone ĉe la forkurintoj kaj rekonduki ilin al la Ligo.

S-ro Lodema raportas pri la fondiĝo de komitato, kiu prenis sur sin la taskon por kolekti la necesan monon por starigi memorŝtonon sur la tombo de S-ano Karnas, de kiu la inaŭguro okazus post la Brusela kongreso. La kunveno aprobas la proponitajn rimedojn por akiri la necesan monon.

Al demando ĉu progresis la solvo de la UEA-problemo, la prezidanto respondas ke li refoje skribis al S-ro Kreuz, sed respondo ne venis. Tre atentindan artikolon, verkitan de S-ro Petit komit- tano de UEA, aperis en Franca Esperantisto, koncerne la landojn kie ekzistas pli ol unu nacia asocio.

Konsiderante ke al multaj demandoj kaj proponoj por kunla- boro de FLE, la estraro de UEA ne ankoraŭ juĝis konvene serĉi solvon, la granda plejmulto de la ĉeestantoj esprimas la opinion ke sekve la neajn rezultatojn de la klopodoj de la Ligestraro, ĝi ĉesu la insistadon ĉe UEA kaj prefere turnu sian atenton al plivigliĝo de la enlanda movado.

S-ano Lodema fiksas la atenton de la kunsido pri la redaktoreco de Flandra Esperantisto; li estis kunlaboranto de S-ano Karnas kaj pro ties morto la laboro falis sur la ŝultrojn de S-ano Lodema.

Ĝis la indiko de nova ĉefredaktoro, S-ano Lodema akceptas sin okupi pri la kompilado de la bulteno; li deklaras ne povi akcepti definitive la postenon, estante ne flandro sed nederlandano. Ĉar neniu respondas al la alvoko por akcepti la redaktorecon, la prezidanto demandas ke sin anoncu la samideanoj kiuj povus regule kaj daŭre liveri tekstmaterialon.

Santempe estas rememorigite ke la artikoloj — prefere maŝin-skribitaj — devas esti ensendataj, plej laste la 12-an de ĉiu monato.

S-ro Lenaers de nun prizorgos la esperantan rubrikon en la bulteno de Flandra Turista Asocio (VTB).

La prezidanto raportas ke li ricevis proponojn de S-ro Lenaers por ampleksigo de la propagando, ĉefe en la gazetaro, sed necesas ke la grupoj kunlaboru; post pristudo, la grupoj ricevos la necesajn informojn.

La kunveno estas informita pri la traktadoj por eventuala partopreno al la Flandra manifestacio projektita por la 31-3-35 en Brussel, sed kiu poste estis malpermesita.

Tiu malpermeso kaŭzigis, ke ĉiuj flandraj societoj vengeme decidis bojkoti la Bruselan ekspozicion. FLE deziras sin asocii al tiu bojkotado sed la LKK rimarkigas ke multe da elspezoj estas jam faritaj kaj ke decido en tiu senco ankaŭ signifus fiaskon de la kongreso kaj grandan monperdon por organizantoj. Post longa diskuto, la kunveno konsentas ke la kongresdato estas tro proksima por komplete ŝanĝi la programon, sed konstatas ke tamen ĝi devas fari geston de solidareco kun la komitato de la malpermesita manifestacio. Konsiderante la aliĝon de tre multe da eksterlandaj samideanoj, por ili restos sur la programo la vizito al la ekspozicio; la flandroj sin detenas kaj anstataŭe faros ekskurson al Tervueren.

La prezidanto memorigas ke ĉiujare oni povis jam anonci la urbon kie okazos la sekvontan kongreson; li demandas ke la grupoj ĉe kiuj ne ankoraŭ okazis kongreson, kaj precipe Leuven, ekzameni la eblecon aranĝi nian 7-an.

Post pritrakto de variaj punktoj, la kunveno finis je la 4-a posttagmeze.

La Sekretario.

Pri Propagando

Estas konata fakto ke 90 % de nia propagando nuligas pro la indiferenteco de la aŭskultantoj kaj mi aldonu pro la netaŭga metodo de la propagandistoj!

Cu ni racie konkludu: nu, plej bone estos ke ni lasu la propagandagadon al kompetentuloj, ekzemple en nia Ligo al nia propagandestro? Tute ne. Estas alia solvo, alia rezonado, kiu konkludigos: nu, ni plibonigu nain propagandmetodon. Ni lasu al nia propagandestro la ĝeneralan laboron, ekzemple la redaktadon de artikoloj por ĵurnaloj kaj revuoj, la organizado de informservo kaj skriba kurso, sed dum ke li tenas la kapon de nia tirbesto nomata propagando, ni

staradu ĉe la alia flanko, ĉe ĝia vosto kaj pinèu ĉu dolĉe, ĉu akre en ĝi por antaŭenirigi la bezonatan beston: ni de tempo al tempo diru al redakcio de ĵurnalo ke ni ŝatus ion legi en ĝi pri Esperanto; ni persone influu redakciojn, ni ĉe urbestroj, lernejestroj, pastroj, societestraranoj, parolu pri nia movado montrante seriozan materialon. Montru al 100 personoj libron kiel Jane Eyre, Per Balono al la Poluso, La Leono de Flandrujo, kaj ili miros pri la rezultoj jam atinigitaj en la literatura kampo.

Ni ne diru « estas cent mil esperantistoj en la mondo » ne pruvante tion. Montru ekzemple la jarlibron de UEA.

Ni ne fanfaronu en kafejo aŭ surstrate pro nia kono de esperanto, sed montru al interesuloj leteron de nia korespondantino el Finnlando, Japanujo, Brazilio.

Ankaŭ la grupoj racie organizu la propagandon: mi legas en la rubriko esperantista de « Toerisme » — jen serioza revuo montrinda kaj montranda al dubantoj — ke nia propagandestro Sro Lenaers esperas iam legi vojaĝraporton de flandra samideano pri la uzebleco de Esperanto; nu, mi tian raporton antaŭ nelonge ricevis de amiko flandra. Pro ĝia tro persona enhavo mi ne publikigis ĝin en Flandra Esperantisto, sed mi volas citi, i. a. tiun frazon: « ke en » Praha ĉe la pordo de la diversaj kunvenoj (kafejoj), estas plato » aŭ ŝildo kun granda verda stelo — estas la ĉefa afero, kiun vidigas » la indikilo — kaj la nomo de la grupo, kiu tie kunvenas. Ĉio plej » ofte sur blanka aŭ kremkolora fono... »

Sufiĉas por nun; mi instigas la anojn kaj grupojn havigi al mi sian opinion kaj sperton en la propaganda kampo, ĉar ni pripensu tion, kion al mi skribis antaŭ kelkaj semajnoj, estro de grava organizaĵo sociala en nia lando: « Vi ne sufiĉe propagandas Esperanton kaj memoru ke NEKONATE ESTAS NEAMATE ».

LA PREZIDANTO.

Komunikoj de la Brusela Kongreskomitato



Kun jena numero de F. E. ni refoje dissendas aliĝilojn. La kongresontoj, kiuj ĝis nun nur pagis la kotizon, uzu ilin por kompletigi siajn pagojn kaj la ceteraj samideanoj tuj interplenigu kaj resendu ilin al ni.

Ni avertas la maldiligentajn dubemulojn kaj la « aliĝantojn de la lasta horo » ke, ĉifoje, la organiza komitato sin trovas antaŭ grandaj malfacilaĵoj, se la petoj por loĝado ne atingas nin minimume unu monaton antaŭ la kongreso. Kelkaj tagoj nur disigas nin de tiu dato; sekve tiuj, kiuj ne deziras tranokti sub libera ĉielo aŭ pagi cent frankojn por ĉambro — ili rajtos elekti — pagu nun por

la loĝado!

Ni tre rekomendas al partoprenantoj, kiuj deziras dormi multnombre (4 aŭ 6-ope) en sama ĉambro, rilati plej baldaŭ kun la

organiza komitato; ili ĝuos tre favorajn kondiĉojn. (Rekomendite al la grupoj).

La ĝisnuna nombro de partoprenontoj autaŭvidigas grandan sukceson. Krom tio en eksterlando la intereso por nia 6-a montriĝas eksterordinare granda; aliĝoj nin atingis jam de el Anglujo, Francujo, Germanujo, Svisujo, kaj Nederlando. Multaj sekcioj de Flandra Ligo jam sciigis grupan partoprenon, kontraŭe el aliaj lokoj nin atingis nur individuaj aliĝoj. La grupestraroj propagandu dum la kunvenoj, ili laŭ eble organizu karavanetojn al nia kongreso. Ĉiu streĉu siajn fortojn kaj, malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj, la Brusela Kongreso iĝos la plej rememorinda okazintaĵo de nia movado.

Ĉi-kune ni publikigas la provizoran programon; ni esperas ke ĝi estos alloga kaj plenumos ĉies dezirojn. La ejoj troviĝas ĉiuj en la mezo de la urbo, tempoperdo do ne okazos. Ĉiuj aranĝoj estos zorge organizataj kaj la bankeda manĝokarto egalos tiun de la Ostenda!

Dum la dimanĉa festo niaj Antverpenaj samideanoj ludos la unuaktaĵon: « La Somero de la sankta Martino », el la franca majstre tradukitan de nia karmemora ĉefredaktoro J. Karnas.

Ni jam nun petas ke ĉiu ĉeestu la komunan fotografadon, kiu okazos la dimanĉon antaŭ tagmeze. Ni ankaŭ konsilas al la partoprenontoj laŭeble ĉeesti ĉiujn aranĝojn, ili estos same interesaj.

La propagandservo de la Brusela Mondekspozicio sendis al ni en Esperanto eldonitajn propagandprospektojn kun plano; ni dissendas ilin kiel aldono al jena numero de F. E.

Ni finas insistante lastfoje pri tuja aliĝo kaj fiksante rendevuon al ĉiu flandra samideano en Brussel dum Pentekosto!

LA L. K. K.

Notu bone! Post Pasko la kongreskotizo altiĝis ĝis 12 frankoj!

6-a Flandra Kongreso de Esperanto. Brussel, pentekosto 1935

PROVIZORA PROGRAMO

Sabato 8 Junio

- 16 -a La akceptejo « Breughel » malfermiĝas kaj funkcias la tutan vesperon;
- 19 1/2-a Komuna foriro el la akceptejo al « Hof van Tilmont »;
- 20 -a Malfermo de la Kongreso en la salonoj de « Hof van Tilmont » (bonvenparoladoj de la prez. de la L. K. K. kaj de Flandra Ligo);
- 20 1/2-a Montrado de la filmoj de la antaŭaj Flandraj Kongresoj; samhore: en aparta salono kunveno de la estraro de Flandra Ligo;
- 21 -a Amuza Ĉe-kurso de Ĉe-instruisto de Kegel;
- 22 -a Interkonatiĝa vespero kaj balo kun fama dancorkestro (la dancado daŭros ĝis la 1-a, dum paŭzo: deklamoj kaj kantoj).

Dimanĉo 9 Junio.

- 9 1/2-a En la kapelo de Pletinckxstraat katolika diservo (Esperanta prediko);
- 10 1/2-a Sekvantara iro al la urbodomo (fotografado sur la ŝtuparo de la Borso);
- 11 1/2-a Oficiala akcepto en la urbodomo;
- 11 1/2-a Jarkunsidoj de Flandra Ligo Esperantista kaj de Flandra Esperanto Instituto en aparta salono de la urbodomo;
- 13 1/2-a Komuna festeno en « Brasserie Flamande »;
- 16 -a Promenadeto en la Botanika ĝardeno;
- 19 1/2-a Esperantista festo en la granda festsalono de « Brasserie Flamande » (kantoj, deklamado, teatraĵo, k. t. p., vidu specialan programon);
- 22 -a Granda balo (la dancado daŭros ĝis la 2-a).

Lundo 10 Junio

- 9 -a Vizito al la urbaj vidindaĵoj sub kompetenta gvido; samhore: Fakkunsido de F. U. K. E. (Pletinckxstraat);
- 11 -a Komuna tagmanĝo en la akceptejo;
- 12 1/2-a Komuna foriro al la Brusela Mondekspozicio (per specialaj tramoj) aŭ vizito al la muzeo de Tervuren kaj la belega parko (laŭplaĉe);
- 19 -a Adiaŭa vespero en la akceptejo.

La Ligno-Inkrustado (Het Houtinleggen).

La ligno-inkrustado estas malnova metio kiu ege prosperis en Flandrujo kaj kiu, grandparte, helpis al famigo de la flandra arto. La kolektoj, kiujn nuntempe ni povas admiri en muzeoj, konsistas el kreitaĵoj plej diversaj; ĉiuj de mirinda beleco. Kutime oni trovas la inkrustaĵojn aplikitaj al mastrumaj objektoj kaj precipe en la ornamaĵoj de paradŝrankoj, murpaneloj, teleroj, armaĵoj kaj armiloj. Kelkaj rimarkindaj altarbenkoj kaj kamenkornicoj de flandraj fajrujoj montras interesajn ligno-inkrustitajn frisojn.

La ligno-inkrustado (elsegado kaj kunmeto de diversaj lignospecoj, plejofte de granda beleco kaj malofteco) estas vera artmetio. Ĝi estas manlaboro kiu, tiel de la elsegisto kiel de la inkrustisto, postulas grandan lertecon kaj, memkonpreneble, elprovitan paciencon. Antaŭ ol finlaborita objekto forlasas la stablon, ĝi necesigis diversajn prilaborojn, kiuj ĉiuj devas esti de ekzempla precizeco.

Dum tiuj prilaboroj artisto kaj metiisto nepre devas sin reciproke kompletigi. Post la skizo venas la desegno de la linietoj per la segilo sekvendaj (? Red.), poste la aplikado de la necesaj lignospecoj laŭ ilia rezistokapablo, koloro kaj ceteraj ecoj. Por atingi plaĉan tutaĵon necesas lerte uzi la diversajn kvalitojn ĉar, malgraŭ la diverseco, kiun la naturo al ni prezentas en la lignospecoj, la nuancriĉeco estas limigita. Se bezone oni tamen povas apliki koloradon kvankam tio, plejofte, ne estas konsilinda.

Post ĉiuj tiuj precizaj preparlaboroj okazas la kunmetado per la dikfingro kaj, kelkfoje, helpe de la speciala inkrustista marteleteto. Ĉiuj lignospecoj — ofte tre malgrandaj kaj sekve facile rompeblaj — nepre devas esti de la bezonata grandeco, por ke ili plenigu precize la lokojn al si rezervitajn. Se inter la pecetoj ekzistas tro granda spaco, la rezultato endangeriĝas ĉar la juntoj devas resti nevideblaj. Laŭ la precizeco de la juntoj oni taksas la konon de la segisto; li devas esti : desegnisto per la lignosegileto.

Dum la pasintaj jarcentoj Flandrujo sin rimarkigis en tiu arto kaj posedis multajn lertajn metiistojn. Nuntempe oni ankoraŭ praktikas ĝin kvankam malpli grandskale. Kiu el ni ne konas la artajn murkalendaretojn tiom ŝatatajn en flandraj medioj ? Kaj la serion « Vlaamsche Koppen »?

Ne, tiu artmetio ne ankoraŭ mortis; kontraŭe, ĝojigaj signoj montras al ni ke ĝi surpaŝas novajn vojojn, sin adaptas al novaj bezonoj kaj sekvas la hodiaŭajn direktojn en la dekoraciarto.

E. CORTVRIENDT.

Mannekenpisado

aŭ rimata rimaĉado pri Kongreso kaj sukceso.

Kongreso! — Sukceso! — Tiuj vortoj rimas — sed mi timas — ke ne ĉiam estas la vero — eble estas zero — ĉiam neordinara afero...

Mi iris al Bruselo — la kandelo — la juvelo — la ĉielo — kiu sub sia mantelo — kaŝas ankaŭ iun alian ol mielo!

Mi iris al la Fornostrato — mallaŭte kiel nokta kato — fiere pri l'inciato, — jam longatemp'en mia koro — (tiu trezoro — de bonhumoro — aŭ ujo de doloro).

— Bonan tagon, sinjoro — mi diris ĉe la stratangulo — ĉar laŭ la regulo... de diligenteco — kaj de boneco — estas tiamaniere — iom severe — ke ni salutas unu la alian surtere — (kompreneble se la « ino » — restas ekster la kombino, — ĉar tiam estus « bonan tagon, sinjorino! »).

Sed jam la « ne-ino, » kiun mi serĉis « Mannekepis » — respondis — tre severe, (mi vetas ke li konas la formulon parkere): Tagoni! ĉu eble viestas ĵurnalisto? — Popolo diras mensogisto — Tiam vi perdas vian tempon — ĉar « vintro » iĝas eĉ « printempo » — kaj blanka, nigra — kaj ŝafa, tigra — se lio al la ĉefo plaĉos — ili prikraĉas — kaj fleksas — kaj reteksas — la veron — por kontentigi politikan atmosferon.

— Mi petas pardonon — (intertempe mi jam prenis mian kranjonon) — Via Brusela Moŝto — Je Pentekosto — mi revenos ne kiel nun je malfruvespero ... sed kun la signo de l'Espero — portata de la karavano — de centoj de samideanoj.

La plej maljuna Bruselano — ree respondis kun rigardo — kvaŭ mi estus leopardo:

— La vortoj viaj estas malklaraj kiel mustardo!

O fanfaronaj Bruselanoj; o vortoj fortepianaj !

Ankaŭ la miaj ne estos plu porcelanaj — nek marcipanaj!

— Aŭskultu do, ho « granda » homo, kaj manĝu tiun-ĉi terponon, — pli hela ol akvo el via fontano, terura infano!

La 6a Flandra Esperantokongreso — certe rimos kun « sukceso » — ĝi estos plena de intereso — ĝi estu konfeso — de nia neceso — de nia progeso. — Mi ne estas ĵurnalisto — nek mensogisto — malgraŭ tiu kraĵono — (kiu flanke de vi jam ŝajnas bastono) — kaj nur notos vian historion, — interkrampoj: Ni ankaŭ vizitos vian ekspozicion!»

En la fajro de mia parolado, — mi forgesis la akvojetadon.

Malseka estis mia veŝto... kaj la « besto » — nun laŭte ridis...

Kaj tio gvidis — lin, al plej bonaj intencoj — kaj mi ricevis la rekompensojn — de liaj sciencoj:

* * *

« Iam — (kiam — li ne diris) — mi iris, li ekrakontis, kvazaŭ profeto lin inspiris — promenadi laŭ la remparoj — Dum tiuj jaroj — potenca malamiko — (Kies nomo eble estas trovebla en kroniko) — sieĝis nin dum multaj tagoj. — Nur pensu pri egiptaj plagoj — sed pli terura ja li estis — nin restis — nur la morto!

« Sed ni defendis nian sorton... La ventroj kaj stomakoj — eĉ ne trovis pastinakojn, — nek limakojn — nek ratojn... por manĝi.

» Sangi — tiun staton — ne povis iu nutrajkomitato — kiel antaŭ dudek jaroj... kiam nin vizitis aliaj soldataroj.

» Ni tamen kuraĝe — sovaĝe — batalis por la libereco — kiel speco... de diabloj... (Mi ne deklamas fablojn — sed nur la nudan, — krudan veron) — Ni ja provokis la danĝeron!

» Kaj vidu! — ne ridu — malaperis la terura malamiko — sen komuniko — nek kritiko — subite — hipokrite...

» Kaj la malsaĝaj Bruselanoj — (grandaj infanoj) — ekfestis — kaj estis — forgesintaj la danĝeron, la suferon, la mizeron!

» Precize tiun-ĉi momenton — (mi ŝatas la silenton) — mi promenis — kaj alvenis — ĉe urba la remparo.

» Jen io fumis, lumis — ĉu estis cigaro?

» Tuj mi komprenis — kaj pro kolero blasfemis!

» Estis meĉo... kaj nenie akvo, nek koto, nek feĉo...

» La vento blovis — Se mi ne estingi povis... la festado — iĝus... brulado!

» Kion fari — por ŝpari... Bruselon... Ne estis bagatelo!

» Tamen mi ion malkovris — kaj manovris...

Ne estis Ameriko, nek iu planedo — sed la rimedo... por nin savi de la pereco — Ideo — pli simpla ol Colombo-ovo — Jen mia trovo:

» Farante naturan bezonon, — mi akvumis la duonon — de la meĉo jam brulita... kaj Bruselo estis savita...

» Kiam nun la burĝoj konis mian agon — tutan tagon — portante flagon — triumfe ili portis min tra la stratoj... kaj inaŭguraj komitatoj — estis formataj je mia honoro — Kaj sen humoro — ili metis min sur trono — sen ĉemizo — nek kalsono — por daŭrigi naturan bezonon... tra jarcentoj... kaj jarcentoj. Amen! »

* * *

— Tamen — mi denove demandis kun diskreto — mi jam vidis Vin en alia tualetto.



Ĉarma angulo en Malnova Bruselo.

— Sekve de via persisto — mi ne neos tiun ekziston — sed spite mi restas nudiston!

— Mi dankas Vin, sinjoro — kun ĝojo en la koro; — mi iras for kaj rimas je la via gloro.

Tiam mi salutis lin.

— Helal! Li haltigis min.

Kurioze mi rigardis lin.

Kaj el la buŝo de l'plej maljuna Bruselano — kiu ne timas maljunecan profanon — mi aŭdis tiajn vortojn aŭgurajn... kaj sentis eĉ trememon kruran. — Diru al la Flandraj Amikoj — ĉu de « verda » aŭ alia radiko — ke mi deziras la bonvenon — kaj partoprenos la festenon.

« Sed ili ne forgesi povas — kiel strange vi eble ĝin trovas, — flandre paroli estas devo — nur tiamaniere la revo — de tutflandra Bruselo kiu estas mia kaj via celo — sin povas efektiviĝi — kaj forigi — la francan etiketon — la fremdan tualeton.

— Mi ĝojas vian konsilon, — mi certe uzos iun ilon — ho plej maljuna, juna knabo, — tro longatempe ni permesis tiun kulturan rabon.

Nun mi foriris — miaj vortoj certe inspiris — ĝojon al la eterna akvojetanto —... ĉar li adiaŭis eĉ per kanto :

« Molenbekaj popoloj, popoloj!

Ni ja ne timas « Marolojn!»

* * *

Ni do iros al Bruselo — la kandelo — la ĉielo — la juvelo.

Kongreso rimas kun sukceso.

En la Esperanta rondo... ni ja parolos la lingvon de l'mondo...

Sed kiel flandroj kun la Bruselanoj — nur la flandran, gesami-deanoj!

Pol VARENS.

Leteroj el Esperantujo

VII.

Amiko la Koko,

Ĉu Benito Mussolini estas favora al Esperanto? Mi pensis ke jes, ĉar estis li, kiu invitis la tutmondan Esperantistaron al la Kongreso en Roma. Tamen... mi trovis kaŭzojn je dubo. Ĉar en la nederlanda semajna gazeto « Haagsche Post », mi legis recenzon pri libro, pri la Itala ŝtatgvidanto. La libro pritraktas inter alie: ideojn kaj vortojn de Mussolini. Laŭ tiu libro Mussolini diris pri « Poetoj kaj Arto »:

« Dante estas la plej granda. Li sole scias, ke vortoj estas krei- » tajoj kun propra vivo. Li movigas ilin, kiel vivantajn estaĵojn, » donas al ili la liberecon, instigas ilin, libere sin envicigi en la » fako de la versaro. » Tion Mussolini diras pri Dante kaj la vortoj, kaj li daŭrigas:

« Esperanto kondukus ĉian literaturon en abismon, (te gronde » voeren) kaj kio estiĝus el mondo sen literaturo? Sed estas formi- » ĝante speco de monddialekto; la tekniko kaj sporto formas tion » senkonscie kaj senpere. »

Do laŭ tio Mussolini ne estus favora al Esperanto! Iom poste, mi prenis « Heroldon de Esperanto » kaj miaj okuloj vidis:

Benito Mussolini: Vivo de Arnaldo. El la Itala tradukis K. Kalocsay. Eldonis « Literatura Mondo ». Mi rajtas supozi ke la fama verkisto Kalocsay petis « la afablan permeson de la aŭtoro », antaŭ al traduki la verkon, ĉu ne?

Do: Mussolini aprobas ke oni tradukas en literaturreduantan lingvon liajn proprajn verkojn!

Ankoraŭ iom poste, mi legis en « The British Esperantist » : « Esp. libro tradukita en 16 lingvojn ». La titolo estis : « Fine Mi Komprenas La Radion! » Ĝi ne estas nura « literatura verko », ĝi estas pli teknika. Sed sendube ekzistas verkoj, originale en Esperanto, kiuj estas tradukitaj en plurajn naciajn lingvojn.

Cu vi, amiko, ne konas iun influhavan italon, kiu Mussolini povas atentigi pri tio?

Denove mi prenis alian gazeton; nun « La Praktiko ». Ĝi estas eldonata de « Internacia Cseh Instituto ». Mi supozas ke ĝia legantaro plejparte konsistas el tiuj, kiuj Esperantistiĝis per la Cseh-metodo. Ĝi estas tre leginda kaj enhavas rubrikon: « Al la Venko ». Ĉiu « venko » estas numerata; kaj la lasta « venko » portas la numeron 379! Strange, ke post 379 venkoj ni ankoraŭ devas batali. Tamen la rubriko estas tre interesiga.

Sub n° 358 mi legas, ke en la urbkonsilantaro en Hago oni *proponis* la instruadon de Esperanto. Sub n° 362: La Konsilantaro de la franca urbo Châteaurenard *postulas* la instruadon de Esp. Sub n° 360: « Esperanto-Ekzamena Komitato en Nederlando oficialigita ». N° 367: Ankoraŭ franca urbo, kiu *postulas* la instruadon de Esp. En tiu sama rubriko mi legas pri: Rozo « Doktoro Zamenhof », pri « Esperanto-bicikloj », pri cigaredoj kun la nomo « Esperanto ».

Jen nur mallonga letero; volonte mi skribus pli da novaĵoj, sed la redaktoro...

Kun konataj sentoj,

R. LA VULPO.

Gardenimpreso

Leo Simoens.

Novembro.
Griza aero,
Griza pluvo,
Malsekaj arboj;
Flavruĝaj folioj,
Benkoj izolaj,
Rondaj marĉetoj
Silento premadas,
Tagoj lacadas,
Belrevoĵoj faladas.

Amiko

Leo Simoens.

Se vi estas mi
Kaj mi nur mi mem,
Amikec' ne valoras!
Sed se vi estas mi,
Kaj mi estas vi,
Amikeco ja floras!

trad. el la flandra: F. R.(Brugge)

Ŝipekskurso Antwerpen-Vlissingen-Antwerpen

Subskribinto intencas aranĝi ŝipekskurson al Vlissingen, dimanĉon la 7an de julio. Ĉiu samideano(in)o, kiu povas atingi Antwerpen antaŭ la 8a horo matene kaj reiri hejmen post la 21a. vespere, liberigu sin tiun tagon! La Antverpenaj gesamideanoj neniam preterpasigis la okazon por ĝui tutan tagon sur la bela Schelde! En la proksima numero ni donos pli detalajn informojn. La prezo verŝajne ne estos pli ol 15 frankojn. Oni povas sin jam de nun anonci ĉe.

A. LODEMA.

Houwerstraat, 22, Antwerpen.

Diversaj Komunikoj

Ni ĝojas ricevante tiom multe da kopio de niaj konstantaj kaj ne konstantaj kunlaborantoj.

Precipe tamen antaŭ la kongreso, ni ne povas aperigi ĉion alsenditan. Ĝis junio Brussel ĝuas la favoron... ĉar eventuala malsukceso de la kongreso ne povos esti riproĉata al la Redakcio de Fl. Esp! Tial ni sekvigos la titolojn de la ricevitaĵaj verkaĵoj, kiuj aperos... iam:

1. Rakonto sen Titolo.
2. La Nederlanda Literaturo en la Rusa Literatura Enciklopedio.
3. Donu al Cezaro...
4. La Ansero.
5. La Cokoladulo.
6. La Sepa Jarkolekto.
7. La Brusela Dimanĉmatena Foiro.
8. Blua Amlegendo.
9. Homo inter Homoj.

Plie estas kelkaj ensendaĵoj de S.ro Pol Varens, kiuj momente ne troviĝas en la redaktejo.

RED.

GRATULOJ.

Al Sro J. Genar, prezidanto de la Flandrema Grupo Esperantista kaj al lia kara edzino pro naskiĝo de fileto Fritz.

EKZAMENOJ

La 5an de majo, je la 9a matene, okazos ekzamenoj, pri simpla kaj supera kapableco, en Leuven.

Partoprenantoj el aliaj urboj kunvenu ĉe la stacidomo je la 8.30 a.

Partoprenantoj pli malfrue alvenantaj sciigu tion al J. Terryn, Raapstraat, 82, Gent.

— Al F. R. Brugge. Bonvolu sendi la originalon (se eble) de via traduko « Saĝeco » de Verlaine al la Redakcio.

— Al Tyneverum kaj P. Varens. Viaj artikoloj pri Jacob van Maerlant estas kompostitaj, sed... mankas loko!

LA NEDERLANDA FERVOJADMINISTRACIO eldonis tre belan ilustritan faldfolion kun geografia fervojkarto kaj la tarifo de fervojabonoj.

Oni povas peti ekzempleron al adreso: Administracio de la nederlandaj fervojoj, Servo de ekspluatado. Utrecht.

Bibliografio

SVEDA ANTOLOGIO. 2-a vol. Sub redaktado de Sam. Jansson. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 204 paĝ. Prezo : broŝ. 24 fr., tuttote bind. fr. 32,50. Du volumoj kune broŝ. 51 fr., tole bind. 60 fr.

Post la multpromesa unua volumo ni komencis legi kun granda atendo kaj atento la eksteraj same belan, duan volumon, dediĉitan al la sveda literaturo.

En la dua volumo ni renkontas la nomojn de novaj verkistoj, kies apero en la literaturo tamen datumas de antaŭ la jaro 1920. Kelkaj el ili estas generale konataj en la tuta mondo, unuavice Selma Lagerlöf, kiu per kvar bonege elektitaj majstraĵoj estas reprezentita. El la prozverkistoj ni nepre devas mencii la — bedaŭrinde tro frue mortintan — Pelle Molin, kies noveloj estas tute unikaj kaj el la belaj, eble la plej bela estas la « Danco kun urso ». Sed la epizodisto Albert Engström, kiu ne timas eĉ la profundon de la homanimo, la filozofemaj Ellen Key kaj Hans Larsson, la melankolie rezigna Hjalmar Söderberg, la iom pesimisma Sigfrid Siwertz kaj la komikajn kaj tragikajn momentojn tiel majstre unuiganta Hjalmar Bergman same kaptas nian intereson, plaĉon kaj ŝaton. Ne malpli prikoninda kaj ĝuplena legaĵo estas la kolekto de la poeziaĵoj, kiu prezentas al ni la poezion de Fröding, tiu ĉi individue profunda animo, la klarajn, serenajn, nur kelkfoje nubigantajn bildojn de Karlfeldt, la sentoplenajn kantojn de Bo Bergman kaj la subtilan lirikon de W. Ekelund kaj Anders Osterling.

La Esperantistaro ŝuldas multan dankon al ĉiuj kunlaborintoj de tiu ĉi vere altvalora verko kaj precipe al la eldonanta societo kiu per la multaj valoraj eldonaĵoj akiras gvidan rolon inter niaj eldonistoj.

G. D.

FERENC SZILAGYI. Dr SZILAGYI'S KURS I ESPERANTO.

Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 96 ± 4 paĝoj. Prezo 12 frankoj.

La aŭtoro, kiu dum sia dujara instruado en Svedlando akiris al si grandan popularecon per sia originala, t. n. projekcia metodo (kun lumbildoj), nun aperigis Esperanto-kurson en libroformo. La belaspekta, 206 unuarangajn ilustraĵojn enhavanta libro ne sekvas tute la antaŭajn bildmetodojn, sed montras tute originalajn pedagogiajn vidpunktojn, kiujn bonege apogas la « dramece » karikatურaj, ridigaj ilustraĵoj, speciale la tutmonde popularaj Adamson-serioj; en la bildoj la agado estas tiom koncentrita kaj frapanta, ke ili vere riĉigas la memoron de la lernanto — kaj plej ofte per verboj, kies gravecon la aŭtoro ne mistaksas.

La libro signifas novan paŝon antaŭen en la evoluo por la ideala lernolibro laŭ rekta metodo. Ĉe unua trafoliumo la metodo eble povas ŝajni iom senorda, sed post atenta tralego oni estas kaptita pro la logika sekvo en la teksto. La libro vekas kaj konservas la intereson ĝis la fino, kie bone elektitaj literaturajoj, tabeloj kaj vortaro kompletigas la plezuron de la komencanto, aŭ eĉ — komencinto.

Malgraŭ la Svedlingva titolo, la libro estas bonega instruilo por ĉiuj landoj. G. D.

Grupa Vivo

AARSCHOT. — **LA PROGRESO.** — La grupo sin preparas por multnombre partopreni la 6an Flandran Kongreson de Esperanto.

Kelkaj anoj jam aliĝis; kie restas la aliaj? Ne tro longe prokrastu por rezervigi al vi oportunan loĝadon. La gemembroj estas ankaŭ insiste petataj; pli regule ĉeesti la semajnajn kunvenojn; ju pli multnombraj ni estas, des pli granda la ĝojo estas.

Antaŭen, propagandu vigle por nia sesa.

ANTWERPEN. — **FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.**

La plej agrabla tasko tiun-ĉi monaton estas tute gratuli nian ŝatatan prezidanton kaj lian amatan edzinon pro naskiĝo de fileto Fritz. Ni esperas ke lia kara edzino kaj fileto ĝuas la plej bonan sancon.

Pasintan monaton niaj membroj lernis novan kongreskanton, nomita « La Kongresanin' ». Ĉar la kanto jam akiris grandan sukceson en la grupo, ĝi iĝos certe vera sukceso dum la kongrestagoj.

Mi sciigas al niaj geamikoj el Antwerpen kaj ĉirkaŭaĵoj ke nia grupo organizos post kelkaj semajnoj novan kurson por gekomencantoj kaj geprogresintoj. La kurso estos gvidata de nia kara amiko C. Schroevers, konata kiel tre perfekta profesoro. Jam de nun oni povas sin enskribigi por la kurso ĉiun merkredon je la 20a en niaejo « Nieuwe Carnot » Carnotstraat, 70.

BRUSSEL. — **N. E. L. E.** — Antaŭ kelka tempo la grupo unuanime decidis aliĝi al « Vlaamsch Verbond voor Brussel ».

La freŝdataj okazintaĵoj montras ke kunagado, precipe en la ĉefurbo, de ĉiuj flandraj unuiĝoj estas urĝe necesa, se ni ne volas daŭre kaj humilige esti neglektataj.

MÉCHELEN. — **LA ESTONTO.** — Niaj kursoj finiĝis kaj ni estas feliĉaj saluti la novajn samideanojn en la grupo.

Ni instige petas niajn membrojn, kiuj sekvis la perfektigan kurson, kaj ofte pro tio ne povis regule ĉeesti la semajnajn kunvenojn, reaperi!

Ne sen iu nostalgio ni pensas pri la kunvenoj de la du antaŭaj jaroj; pri la gesamideanoj, kiuj tiam kun entuziasmo kunvenis ĉiun semajnon. Certe la eksterordinara grava tempo, kiun ni trapasas tre premas sur niajn animoj, sed ni tamen fervore laboru, luktu.

Esperanto nun vivas sed ĉiu haltigo pro senlaboremo koncerne la movado, nur povas prokrasti la finan venkon.

Sub signo de la nova printempo la Mehlena grupo revivu...

Rimarko: Tiuj, kiuj ĝis nun ne aliĝis al la Brusela Kongreso rapidu. Pentekosto jam alproksimiĝas.

OSTENDA GRUPO ESPERANTISTA.

La 17an de marto, por la unua fojo dum la pli ol 3 jara ekzistado, ni organizis festeton inter ni, kiu tre bone sukcesis.

Plejparte ĝi okazis por ekkonigi al la novaj membroj la grupan vivon kaj tial ni ne invitis fremdajn grupojn. Kvardek tri personoj ĉeestis. La unua parto konsistis el diversaj kabarednumeroj: muzikaĵoj, plane, harmonike kaj violone; gajaj kantoj; bonhumoraj paroladetoj k. t. p. Poste estis balo. La intimeco inter ni estis tre granda kaj precipe dum la balo ĝi ankoraŭ kreskis. La orkestron prizorgis pianisto, harmoniko kaj gitarludantoj, kiujn ni je la fino kore dankis kaj honoris pro ilia bona muziko kaj neprofitema kunhelpo dum la festeto. Ankaŭ nian prezidanton ni dankis, ĉar kiel organizinto, li bone sukcesis, laŭ nia opinio.

Invitite de la Bruĝa grupo, ni ĉeestis ĝian feston 14ope, la 31an de marto. Tamen tie ne regis la intimeco kiel ĉe ni, kvankam ni devas diri, ke ĉio estis bone organizita kaj oficiale enkadrigita. Oni aŭdigis kantojn kaj deklamadojn kaj poste prezentis: « Printempo en floroj », dancon faritan de etulino, kaj « Nubetoj », unuaktan teatraĵon. Poste baldaŭ komenciĝis la balo. Ĝi daŭras ĝis la 2a laŭ la programo, sed ni, malfeliĉe, devis foriri ĉirkaŭ la 22a. Ni tre bone amuzis nin kaj post danko al la prezidantino, ni adiaŭis la Bruĝanojn.

Nia unua bicikla veturadeto okazos la 22an de aprilo: vizito al la kastelo kaj ĝardenoj de Wynendaele. Ni esperas je bona vetero.

La 15an de aprilo ni kunvenos por instigi la membrojn kiel eble plej multnombre ĉeesti la Bruselan kongreson kaj kolektos samtempe la aliĝmonon. Ni esperas ĉeesti la kongreson minimume 10ope.

OUDENAARDE. — « AL PACO ».

La grupo ĉiam regule kunvenas, kaj jam kelkaj membroj enskribis por la kongreso.

La programo de la kunvenoj:

La 7an de majo ni havos kantvesperon. La 14an okazos perfekta kurso kaj la 21an ĝenerala preparolado de kelkaj ege interesaj punktoj. Nia unua ekskurso verŝajne estos al Kerselare. Pri tio ni ankoraŭ parolos kun interesemuloj.

La adreso de la sekretario, de nun estas: Nederstraat, n° 8. Oudenaarde.

(Ni petas al « Al Paco » skribi al la Redakcio kaj ne al S.ro De Haaff).
RED.

RONSE. — LA PACA STELO.

Kvankam la vivo iomete malvigliĝis, oni tamen tre regule kunvenas kaj jam por la proksima monato oni projektas la ekskursan programon, aŭtobuse, piede, bicikle kaj vagonare.

Rilate al la nacia kongreso en Brussel, ni esperas noti la 20an partoprenanton post kelkaj tagoj, kaj kiel kutime, la ge-Ronsanoj ne kunportos vinagromienon, sed la pacan amvizagŝon.

Proksiman monaton, oni sciigos pli intensan laborprogramon pritraktotan en la grupo.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

(Vlaamsche Esperantisten - Bond)

Voorzitter: Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst.
Ondervoorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

Aalst: « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Groote Markt; vergaderingen elke Woensdag avond.
Aarschot: « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 10, vergaderingen elken Woensdag avond.
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.
Brussei: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquemainlaan, 37; vergaderingen elke Dinsdag avond.
Edegem: « Nia Idealo », Hovestraat, 130.
Hamme: « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Kortrijk: « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Lede: « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.
Leuven: « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
Lichtervelde: Sekretariaat, Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto », lokaal: Bovenzaal der stedelijke Bibliotheek, Wolle markt; vergadering elke Vrijdag te 20 uur. — Briefwisseling: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54.
Nieuwpoort: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Langestraat, 6.
Oostende: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48
Oudenaarde: « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat 8.
Roeselare: « Ruselara Grupo Esperantista »; Statedreef, 177.
S. Niklaas: « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

Diksmuide: M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.
Gent: Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stacegemstraat.
Hoboken: J. de Groot Caronstraat, 31.
Maria-Hoorebeke: Gerard Broodcoorens, Dorp.
Meenen: K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
Millen (Tongeren): L. Geukens, Langstraat.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.
Thielt: R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

ESPERANTISTOJ!!!

La

KANTARO ESPERANTISTA

Kompilita de Juul Karnas

enhavas 111 kantojn,
estas 112 paĝa,
enhavas ion por ĉies gusto,
enhavas la plej belajn perlojn el la
popolkantoj de ĉiuj nacioj,
estas bele eldonita,
kaj ... kostas nur 6 frankojn!

Mendu ĝin tuj ĉe
H. v. d. Mast. poŝtkonto : 209.852.
Tweelingstraat, 6, Antwerpen.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brusel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj
malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

Kien iri je Pentekosto 1935? (8 - 10 Junio Al la 6^A Flandra Kongreso de Esperanto en Brussel

Abonu tuj la monatan gazeton

“ LA JUNA VIVO ”

Jen vi havas la plej malkaran gazeton por gejunuloj kaj komencantoj. Interesa enhavo, facile komprenebla lingvo; tre taŭga legaĵo por kursoj.

Jarabono : 15 fr.

Petu senpagan specimenon de :

Redakcio de « LA JUNA VIVO »

West-Graftdyk N. H.

Nederland.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpvest, 26, Antwerpen.